Genrokvira
Esperanto-Ligo

Por tuja publikiĝo

Kontakti: Mia Nordentoft
Retpoŝtadreso: ligo@genrokvira.org
Dato: February 26, 2017
Ŝablono de Vel <vel@latextemplates.com>, CC BY-NC-SA 3.0
Enhavo laŭ sama permesilo.

Pri IJK en Togolando

La Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) okazigas la ĉi-jaran IJK-on en Togolando—lando kiu ne garantias la sekurecon de GLATanoj

February 26, 2017 – Multaj parolas pri kiom bone estas havi IJK-on en Afriko, sed forgesas pri la homrajtrilataj problemoj, kiuj aperas pro la elekto de lando.

Okazos ĉi-somere la unua Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Afriko post multe da interparolo kaj senstariĝo de TEJO. La fokuzo de ĉi tiu diskuto temis pri la eŭropcentra Esperantistaro kaj kiel pli bone diskonigi la lingvon en aliaj partoj de la mondo. Dum tiu diskuto oni forgesis sekurigi la bazajn homajn rajtojn de GLATanoj. La homaj rajtoj estas la bazo de civita socio, kaj tial tolerema komunumo neniam malkonsideru tiujn.

En Togolando la rajtoj de GLATanoj estas tute malkonsideritaj. La puno por samseksa seksumado en la lando estas punpago ĝis CPA 3 mil. aŭ malliberejresto ĝis tri jaroj. En la jarraporto de Amnesty International,[1][2] internacia organizo por homaj rajtoj, mencias la organizo, ke ankaŭ genroidenteco krimiĝas.

Tial la Genrokvira Esperanto-Ligo instigas al kaj GLATanoj kaj ne-GLATanoj ne subteni Togolandon per turismaj impostenspezoj. Supere al ĉio necesas sekurigi la sekurecon de ĉiuj. Tie inluziviĝas ankaŭ GLATanoj kaj en Togolando kaj alilandanoj vojaĝkonsiderantaj al Togolando.

[1] https://www.amnesty.org/en/countries/africa/togo/report-togo/

[2] https://www.amnesty.org/download/Documents/AFR5738522016ENGLISH.PDF